

Supozeble ankaŭ juna generacio facile sekvas rakontadon, kiu nekontesteble atestas kiel sonopentraĵoj estas la vortoj de Esperanto. Simpleco en esprimado estas arto la plej granda. En la jaro 1920 aperis la unua eldono. Tiam juna sviso Edmond Privat ricevis tre favoran akcepton. La pasintaj jaroj nenion forprenis de la lingva sukeco, kiu almenaŭ en mia koro trovis varman kaŝejon. Ekstera aspekto plaĉas kaj belas. Entute estas 176 paĝoj inter plastaj kaj koloraj kovriloj. La prezo modestas ĉe UEA: 9,00 eŭroj. Proksimiĝas la Zamenhofs festojaro celebrotita i.a. en Bjalistoko 2009. Jen valora kaj taŭga legaĵo por bezonoj de studrondoj. Ni pluportu la torĉon kaj ne forgesu la vivoverkon de doktoro L. L. Zamenhof (1859-1917).

— Jorma Ahomäki
Turku, Finnlando
jorma.ahomaki@pp1.inet.fi

Rimarko de la kompostisto: Kvankam ne estas mia rolo komentarii pri artikoloj, mi ne povas rezisti al tenton aldoni mia propran opinion al la artikolo de Jorma Ahomäki. La libro **Vivo de Zamenhof** de Edmond Privat estas mirinda libro (estas malnova eldono en la Libraro Ludovika). Legante ĝin, oni vere spertas la belecon de nia lingvo — estas kvazaŭ poezio. Ekzemple:

„De la patrino la koro, de la patro la cerbo, de la loko la impresoj: jen la tri ĉefelementoj de Zamenhofs genieco.”

„... mortis la patrino tiel kara. Kiu vartis lin bubeto, kiu glatis lian kapon de knabeto, kiu faris lin sentema kaj homama, tiu ĉi nun estis for.”

„Li estis verkisto. De l' frua infaneco li montriĝis jam poeta. Arto lia estis la uzado de la vortoj. Harmonio kaj muzika sento ĝenerala lin inspiris por la lingvo kaj la stilo. Li hontis pri Esperanto ĝis tiam, kiam ĝi fluis tute dolĉe.”

Se vi neniam legis ĝin, mi forte rekomendas tiun libron al vi.

— Steĉjo

Eta Defio Por Vi

Anĝelina, Benjameno kaj Cecilio partoprenas en kur-konkurso por helpi etan karitatan fonduson. Ili kuras 5 kilometrojn. La kurantoj kompreneble kuras malsamrapide, tamen, ĉiu kuranto ne varias sian propran rapidecon. En la momento kiam Anĝelina finas, Benjameno estas ankoraŭ ½ kilometro for de la fin-linio, kaj Cecilio estas ankoraŭ du kilometrojn de la fin-linio. Memoru, ke ĉiu daŭre konstantrapide kuras. Kiam Benjameno transiras la fin-linion, kiom estos la distanco inter Cecilio kaj la fin-linio?

— defias Steĉjo

Ĉe la rivero Waal*


Vent'. Nuboj en blua ĉiel'.
 Aŭdiĝas anas' – kvakkvak el
 la griza cis-diga laget'.
 Ĉirkaŭas vojeton buntflora tapet'.
 Apenaŭ videblas, kaŝita post verdo,
 la larĝa rivero.
 Sed vaste kaj fore l'okul' povas vagi.
 La fluo devigas la ŝipojn zigzagi.
 Ni vidas moviĝon nur de la stirejo.
 Leviĝas transborde la tur' de preĝejo.
 Kaj ej' por kampadi troviĝas sur tero
 trans-diga, proksime al la rand' del'
 rivero.
 Ĉi-flanke situas flaveca plaĝet'
 laŭlonge de eta rivero-branĉet'.
 Senmove sur ĝi staras svelta ĉeval'
 klinanta la kapon nur kelkfoje al
 la akvo ebena ĉe siaj piedoj.

Ja devas agrabli sur ĉi restadejoj.
 Besteto de Nia Kara Sinjor' **
 al kardo flugetas, sin metas sur flor'.
 Rapidflugaj muŝoj de ĉia ekbril'
 fulmdancas. Aŭdeblas la fajnflugiltril'.
 Sur pado sidadas sen mov' papili'.
 Sendube sen tim' ke vi tretas sur ĝi.
 Vent'. Nuboj en blua aero.
 Nur ĝuo por esti ĉe tiu rivero.
 Jes: „Malpermesita alir'” tien ĉi,
 avertas, kaj eble timiga por vi.
 Sed iru sur padoj eĉ malpermesitaj,
 kaj multfoje estos vi tre surprizitaj.
 Ĉar „Malpermesita alir'” sur avizo,
 ja ofte kondukas ĝi al paradizo ...!

— d-ro Hein Wernik

* Elparolu „Val”

** kokcinelo



D-ro Wernik klarigas: „La rivero Waal estas granda branĉo de la rivero Rejno, kiu originas en Svislando kaj fluas en Germanio al Nederlando. La rivero Waal estas la plej trafikplena rivero en Eŭropo pro la ŝipveturado. Nijmegen situas sur la bordo de Waal, kaj multegaj ŝipoj pasas.

„Mi ofte promenas en iu el la interdigaj herbejoj de la rivero, ne malproksime de mia urbo. Pro tio la poemo. Mi mem verkis la nederlandan, kaj poste tradukis ĝin esperanten.”

RESPONDO AL LA KOMENTARIO DE STEĈJO PRI „FRANCOJ KAJ ANGLOJ EN KANADO”

Tre estimata Steĉjo,

Mi legis kun simpatio viajn komentojn. Mi tute komprenas vian korligit-econ al Kanado kiel dulingva lando. Mi ankaŭ komprenas, ke, por vi, Kanado sen Kebekio malfacile imageblas. Mi do komprenus vian malfeliĉon, se politikaj streĉoj iam alkondukus al parta aŭ tuta sendependiĝo de Kebekio.

Vi sugestas, ke ĉiu klera kanadano devus regi ambaŭ lingvojn. Jes! Kaj estas fakte multaj tiaj kanadanoj — aparte en Kebekio. Ekster Kebekio, tamen, bedaŭrinde malmultaj kleraj anglalingvaj kanadanoj pli ol balbutas la francan. Sed oni ne povas riproĉi tion al ili, ĉar en la ĉiutaga vivo ili ne bezonas la francan. Kial ili strebus lernadi malfacilan kaj por si neutilan lingvon?

Kompreneble, anglalingvaj geknaboj povus sufiĉe facile lerni la francan en t.n. mergiĝaj lernejoj. Estas ja multaj tiaj lernejoj tra Kanado, kvankam ili ankoraŭ *relative* malmultas. Sed, se geknaboj, kiuj junaĝe lernis la francan, en sia posta vivo preskaŭ neniam uzos ĝin, kio restos el ilia iama kono de la franca post dudek jaroj?

Kion fari? Kiel en aliaj multlingvaj landoj, tiel en Kanado ne ekzistas facila solvo al la lingva problemo. Ĉu Esperanto povus solvi ĝin? En Eŭropa Unio, certe, sed bedaŭrinde ne en Kanado — pro kialoj menciitaj en mia antaŭa artikolo (*Inter Ni*, julio 2007).

Eble iam ĉiuj kanadanoj sentos sin tute hejme ĉie en Kanado. Eble, male, iam Kanado devos funde ŝanĝi sian strukturon por supervivi. Tio, tamen, antaŭvideble ne okazos antaŭ multaj jaroj!

Francisko LORRAIN